

# La Espero

2012:4



Sur la Granda Muro survoje al UK en Vjetnamo, paĝo 6



KER-ekzameno en Lesjöfors



UK en Vjetnamo, alternativa bankedo, paĝo 5



Esperantodag i Kvarnabo, se sid 4

**someraj agadoj diversloke**

## LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Marto 2012 • 100-a jarkolekto

Fondita en 1913

**Redaktion:** Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

**E-post:** laespero@esperanto.se

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

**Tryck:** Pingvinpress

**Prenumeration 2012:** 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro, tel. 08-34 08 00

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

**E-post:** sveda@esperanto.se

**Nätsida:** www.esperanto.se

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Plusgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 2012:**

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggssexemplar kostar 100 kr/år).

**UEA-avgifter och prenumerationer:** Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

**Postgiro:** 578-5

**Nätsida:** www.algonet.se/~eldona

**E-post:** eldona@telia.com **Telefon:** 070-5850054

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

**Nätsida:** www.esperanto.se (meny Esperanto-Gården)

**E-post:** egarden@esperanto.se

**Telefon:** 0590-309 09

## Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

**e-post:** laespero@esperanto.se

	Stoppdatum	Utkommer senast
--	------------	-----------------

Nr 1	15 januari	15 februari
------	------------	-------------

Nr 2	28 februari	30 mars
------	-------------	---------

Nr 3	30 april	31 maj
------	----------	--------

Nr 4	15 augusti	15 september
------	------------	--------------

Nr 5-6	31 oktober	30 november
--------	------------	-------------

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## NI PREZENTAS

## Sabina Åradsson, kantanta esperantistino



Kiam vi interesiĝis pri Eo? Dum mia universitata studado pri logopedio mia onklo plurfoje provis instigi min lerni Eon, sed tiam mi ne havis tempon. Poste mi ne plu havis kazon ne studi Eon, krome mia patrino kaj mia bo-fratino komencis lerni Eon. Cetere mi nun povas paroli kun mia "bo-onklino" ĉar ŝi ne sci-povas paroli la svedan lingvon.

Ĉu vi estas membro en iu Eo-klubo? Ne, ĉar ne ekzistas klubo en Hudiksvall, kie mi nun loĝas.

Kiujn interesojn vi havas krom Eo? Mi fotas kaj kantas. Mi kantas en Gospelkoruso.

Kion vi preferas foti? Nun mi plej multe ŝatas foti homojn. Estas defio, ĉar homoj ne estas same facile planeblaj kiel floroj aŭ pejzaĝo. Krome, kaj mi kaj la persono fotita devas ekŝati la

rezulton. Mia nuna prefera portreta fotisto estas Christina Greve.

Pri kantado, kiun tipon vi kantas? Ĵuste nun mi lernas "kula", kio estas maniero kantante voki la bovinojn reveni hejmen dum la somera paŝtejo.

Intervjuis Bengt Olof Åradsson

## REDAKTORAJ VORTOJ

**K**omenciĝis la nova stud-jaro por multaj gelernantoj kaj la socia strukturo sekvas la lernejan ritmon pli malpli. Tio kompreneble influas ankaŭ mian pensmanieron. Ne nur je la jarŝanĝo mi pripensas novajn promesojn, novajn defiojn aŭ vivmanierajn ŝanĝojn, sed ankaŭ nun kiam la nova studsemestro estas freŝa.

Ĉi-jare mi donis etan sed espereble ankaŭ plenumeban taskon al mi mem – ĝis la sektontjara somera kongreso mi eklernos minimume 100 novajn vortojn! Tio signifas du novajn vortojn posemajne. Eble ne

granda tasko, sed 100 novaj vortoj tamen estas evoluo.

La plej malfacila parto de tiu tasko, krom rememori la novajn vortojn, estas demeti la libron legatan kaj serĉi nekonatajn vortojn en iu vortaro.

Ĉu iu alia donis similan "promeson" al si mem? Eble legi esperantlingvan libron aŭ ekredakti vikipediajn artikolojn? Rakontu al nia legantaro!

Al tiuj, kiuj volas novan kontakton kaj praktiki esperanton, mi sube donas la kontaktinformon al korespondpetanto de Aŭstralio.

### Kara kompano esperantistoj, amika saluto.

Mia nomo estas Duncan McDonald. Mi skribas el Melburno, Aŭstralio. Mi serĉas iun kiu ŝatus regule korespondamikon kun mi. Mi estas relativa komencanto, do mi ne zorgas pri kiom kompetenta ili povas aŭ ne povas esti. En kazo estas grave iu konsiderante tiun peton, mi edziĝis, neniu infanoj kaj 40 jaroj.

En amikeco, Duncan McDonald  
duncanmcdonald@optusnet.com.au  
twitter: @Bunzabar

## En enda hemsida för allt om esperanto i Sverige – är det möjligt? Är det önskvärt? Ett projekt i den riktningen har startat.

Kontakta oss!

Har din klubb ingen hemsida men behöver plats på nätet?

Kontakta oss!

Har klubben/organisationen en sida som börjar kännas gammal och borde piffas upp?

Kontakta oss!

Vare sig ni redan har en egen domän eller ej, så går det att lösa såmlöst.

I samband med att sidan blir officiell under okt 2012 kommer det även att hållas en kortare introduktion och kurs för hemsidan. Är du intresserad?

Kontakta oss!

Sidan kommer att släppas under Esperanto-Gårdens årsmöte.

Kontakta oss gm Stella Lindblom [stella@bonadomo.se](mailto:stella@bonadomo.se) tel 0565-80388

Det började med att Esperanto-Gården behövde en bättre hemsida. Under teknad skapade kvickt ett förslag som antogs. Under processens gång infann sig två insikter:

1) Hakan håller på med en ny hemsida för att beskriva Esperanto för oinvigda, samt 2) att det finns väldigt lite stöd på nätet för att vara esperantist när man en gång lärt sig språket. Inramningen av projektet föll sig därför naturligt. Det får bli en ny hemsida som fungerar som portal för allt som har med esperanto i Sverige att göra, en sida mest på esperanto – för esperantister.

En portal har vissa fördelar. Där kan vi samordna uppgifter, kostnader och resurser och skapa en hemsida där det finns och händer många saker. Att ha en "levande" hemsida är viktigt om den ska vara intressant och användas. Genom att skapa en portal ger vi utrymme för alla föreningar, klubbar och organisationer som vill delta. Det mesta kommer att vara nåbart genom "kikhål" (*frames*) där andra sidor syns genom portalen. Sidan görs i en form som tillåter att nya delar ansluts vartefter.

På portalen kan dessutom varje enskild medlem få en sida att beskriva sig själv på. Det finns ett gemensamt forum för att diskutera allt som behöver dryftas, antingen i gemensamma utrymmen eller under rubriker för respektive organisation eller särskilt intresse. Stöd för styrelser i olika former håller också på att skapas. Allt för att underlätta alla sorters samarbete.

### Skäl för en Eo-portalsida

"Trafik drar trafik" brukar man säga. Om vi har en gemensam träffyta på nätet så skapar det i förlängningen fler besök. Det gör det lättare för oss som är esperantister att hitta info om aktiviteter, information om media och kultur samt andra esperantister.

Esperantosverige är inte en ny klubb, det är ett samarbete mel-

lan intresserade. För tillfället är vi nästan tio personer som på olika sätt, med olika ambitionsnivåer och olika intressen möts för att gemensamt bygga något som ingen av oss skulle mäktat med på egen hand.

Ett annat skäl för en gemensam esperanto-portal är rent tekniskt. Att hantera en hemsida som är användbar, uppdaterad och händelserik kräver en hel del engagemang och tid. Genom att enskilda som är intresserade av ämnet samarbetar för att skapa något bra för helheten kan resultatet bli att de enskilda esperantoorganisationer som inte har resurser för en bra hemsida kan få tillgång till en i alla fall.

Esperanto är som gjort för internet och internet är som gjort för esperanto. För de flesta yngre människor idag gäller också att "om det inte finns på internet så finns det inte". Det är därför en ren överlevnadsfråga för esperantorörelsen att vi vistas där på ett sätt som tilltalar användaren.

### Vad ska hända på sidan?

På ett möte i juni i år togs beslut om vad sidan ska innehålla. Aktuellt; Kalender och nyheter, Om själva portalen och samarbetet, Dokument; Historia, Språk och Media (böcker, musik osv), Samarbete; Forum, projekthantering och stöd för styrelsearbete, Medlemmar; mina sidor, kontakter och prylbyte samt Organisationer; internationella, nationella, regionala och lokala.

Tanken är att köra med gratis programvara hela vägen. Det enda som kommer att kosta är domänen och webhotellet, vilket uppgår till ca 1000 kr per år för hela projektet. För tillfället är fem personer engagerade i olika delar av hemsidesskapande och översättande, men det finns plats för fler, särskilt nu under den mest intensiva perioden under höst och vinter.

Tre personer är engagerade i att tillföra information såsom kalenderuppgifter samt äldre och

modernare historia. Det finns indikationer på att det även kommer artiklar om musik och möjligen även litteratur.

### Reklam som sidoeffekt

På kongressen i Hanoi konstaterade Amri Wandel att automatöversättningen Google Translate tidigare i år gjorde esperanto till sitt 64:e språk. Det gör att ordet 'esperanto' ständigt är synligt för alla användare världen runt. Sökmotorn Google brukar dessutom förses med en "doodle" som är en specialutformad rubrik med anledning av olika händelser världen runt. På 150-årsdagen för Zamenhofs födelse i december 2009 hade Google en esperantodoodle vilket gjorde att Wikipedia hade 2 miljoner fler träffar än vanligt dagarna efteråt. Ett sådant intresse är svårt att uppbringa med vanliga reklamkanaler.

Detsamma gäller för Joomla – om än i mindre skala – som är ett av de enskilt största programmen för hemsidor. För hemsidan använder vi oss av just Joomla. Det finns tusentals användare och hundratals programtillägg som gör allt möjligt. Joomla görs och underhålls av enskilda engagerade individer som jobbar gratis med programmet. Ledarskapet drivs av påfallande många äldre personer som själva har företag i branschen eller poster på högskolor och universitet. Att ha med "Esperanto" på flera ställen i detta sammanhang är alltså en form av gratisreklam som ständigt ligger där för vem som helst att se.

Adressen och namnet till hemsidan är detsamma: [esperantosverige.se](http://esperantosverige.se). Esperanto-Gården startade projektet och i skrivande stund har SEF och Västeråsklubben anslutit sig och ska få egna delar under portalen. Det finns utrymme för alla om så skulle vara.

**Stella Lindblom**

([stella@bonadomo.se](mailto:stella@bonadomo.se) eller telefon 0565-80388)

### Esperantoinformation på Hisingstorg



Lördagarna 12 maj och 2 juni medverkade Siv Burell, Helfrid Karlsson, Margareta Andersson, Inga Johanson och Andreas Nordström med esperantoinformationsbord på Selma Lagerlöfs torg respektive Tuve torg under olika torgdagar. Tio namn fick de på listan för intresseanmälningar i Backa men endast en i Tuve.

(Bilden är från vårt bord på Selma Lagerlöfs torg.  
Foto taget av Margareta Andersson med Siv Burells kamera.)

### Esperantodag i Kvarnabo

Torsdag den 28 juni träffades nio västsvenska esperantister hos malmöklubbens ordförande Sten Svenonius i hans sommarstuga i Kvarnabo vid sjön Anten, Alingsås kommun. Det är en gammal tradition, som vi återupptog för två år sedan, att en gång varje sommar träffas där. Vi hade som vanligt tur med vädret, åt gott (knytkalas) och satt och pratade, även på esperanto.



(Länk till bilder från träffen:  
<https://www.dropbox.com/sh/y668ewapzri25z3/qIAgg4ETau>  
Bilderna är tagna av Siv Burell.)

### Esperantoutställning på Biskopsgårdens bibliotek

Biblioteksassistent Inga Johanson satte 20 juni upp en liten esperantoutställning i en glasmonter på Biskopsgårdens bibliotek. Hon är utlokaliserad dit under ombyggnationen av Göteborgs Stadsbibliotek, som är hennes ordinarie arbetsplats. Montern står vid bokhyllan för språk och språkvetenskap. Inga inspirerades av en utställning i München och hon ställer bl.a. ut böcker, spel och seriealbum typ Asterix och Tintin. Utställningen kommer att stå uppe hela sommaren.

Foto: Inga Johanson



### Klubo de Stokholmo

En Esperantoklubo de Stokholmo ni havas merkredajn kunvenojn ĉiusemajne en EC je la 18-a horo. Ni klopodas trovi programojn allogajn por iom pli ol 4-5 pers.

Al la estraro de EKS apartenas Ingvar Enghardt prez., Soile Lingman vicprez., Ulrika Hoppe kaskisto, Tatu Lehtilä sekr., Fanny Tjäder membroresponda grupo, kaj Erik Geijer redaktoro de EKSproso.

En septembro-oktobro ni planas jenajn programojn:

- Kongresaj ĉoj de UK en Hanoi, Vjetnamio
- BET 48 en Pala, Estonio
- Aŭtunaj Tagoj de EAF en Alando, Finnlando
- Eŭropa Esperanto Kongreso en Galivo, Irlando

Dum la somero ni kiel kutime havis Kafejajn renkontiĝojn ĉiun duan merkredon. Ni ankaŭ havis eksterlandajn gastojn el Germanio kaj Rusio.

Mi mem partoprenis la Baltmarajn Esperanto Tagojn en Pala, Estonio, oriente de Tartu proksime al la Peipsilago kie estas la landlimo inter Estonio kaj Rusio. Partoprenis 45 personoj el Estonio, Latvio, Litovio, Rusio, Finnlando, Svedio, Luxemburgo kaj Belgio. Estis malgranda renkontiĝo kun persona etoso kie oni havis eblecon renkonti novajn kaj malnovajn geamikojn.

Amike salutas  
Soile Lingman

### Filmvisning på jubileumsdagen

På 125-årsjubileumsdagen den 26 juli ordnades filmvisning på Esperanto Centro i Stockholm för nybörjarkursdeltagare och medlemmar i SEJU.

Under kvällen visades kortfilmen *Conlang* (Planlingvo) på engelska och den japanska tecknade filmen *Min granne Totoro* (Mia najbaro Totoro), bägge med undertexter på esperanto.

Olof Pettersson

## Malgranda raporto pri la UK en Hanojo



Esperanta gramatiko ĉe la Solena Fermo

**L**a kongreso okazis en luksa hotelo Melia, kio donis kaj lavantaĝojn kaj malavantaĝojn. Inter la malavantaĝoj estis ke la salonoj troviĝis dise en la konstruaĵo kaj ne ĉiam facile troveblaj. Krome, ni devis esti transportitaj per aŭtobusoj al la Universitato de Scienco kaj Teknologio por la inaŭguro, fermo kaj vesperaj artaj aranĝoj. Kelkaj avantaĝoj estis ke la hotelo ofertis

senpagan akvon kaj ke ĝi estis klimatizita – foje eĉ tro, tamen. (La universitato ne.) Povas esti kaj avantaĝo kaj malavantaĝo, ke samtempe

la kongresanoj kaj precipe inter la helpantaro. Treege afablaj kaj helpemaj ili estis – kaj ankaŭ talentaj. Ili kantis kaj dancis dum la Movada Foiro, dum la Inaŭguro, dum la Solena Fermo ... Entute estis tre altnivelaj artaj aranĝoj kun profesiaj artistoj. Ni ankaŭ estis invitetaj al la fama Surakva Pupteatro, interesa kaj amuza sperto.

Anstataŭ la tradicia akcepto en la urbodomo fare de la urbestro, ni estis invitetaj de la Popola Komitato de la urbo Hanojo al festa halo de la eĉ pli luksa hotelo Daewoo. Grandaj rondaj tabloj estis bele aranĝitaj kaj profesiaj muzikistoj ludis per tipaj vjetnamaj muzikiloj. Post nur mallongaj paroladoj bele vestitaj kelneroj regalas nin per multaj diversaj trinkaĵoj (teo, vino, biero, suko ...)

en la hotelo okazis aliaj aranĝoj. Ni estis vidataj de aliaj sed ni ne ĉiam estis kune en la samaj lokoj.

La kongresa programo estis sufiĉe tradicia. Vere notinda estis la granda nombro de gejunuloj inter

kaj vico da bongustaj pladoj sur turnebla meza parto de la tablo. Kiam ni foriris, ĉiuj ricevis donacojn: granda keramika vazo kun la blazono de Hanojo kaj la teksto "Donace de la Popola Komitato de la urbo Hanojo al la kongresanoj de UK-97", granda libro kaj pinglo memore al la 1000-jariĝo de Hanojo. Eble kelkaj ne sukcesis kunporti hejmen tiujn grandiozajn donacojn (sufiĉe pezajn).

Inter la kongresanoj la plej granda nombro kompreneble estis el Azio. Japanoj kaj vjetnamoj plej multis, ĉinoj, koreanoj, nepalanoj kaj indonezianoj estis sufiĉe grandaj grupoj. Eĉ el Singapuro, Malajzio, Kamboĝo, Tajlando kaj Mongolio venis esperantistoj. Kaj grupo el Brazilo vojaĝis per la Trasiberia Fervojo tra Rusio kaj poste per trajno tra Ĉinio por atingi la kongresurbon. El Afriko venis kongresanoj el Kongo kaj Burundio dum eŭropanoj estis relative malmultaj, kompreneble, kompare kun dum nia kontinentaj kongresoj.

Resume: Mi ĝuis la kongreson, ĝojis revidi kelkajn geamikojn, novajn kaj malnovajn, kaj havis tre interesan vojaĝon.

Ann-Louise Åkerlund



La movada foiro

## La EEU kongreso



**L**a ĉi-jara EEU okazis en Galivo, Irlando. Galivo estas tre bela urbo en la okcidenta parto de Irlando, kaj la kongresanoj havis la eblecon viziti la urbocentron kaj partopreni en diversaj ekskursoj.

La urbestro de Galivo, Terry O'Flaherty malfermis la kongreson. La kongresa temo estis "Lingvolernado en

Eŭropo: lerni pli, kosti malpli", kaj multe tuŝis la situacion de la minoritataj lingvoj en Eŭropo, precipe la irlandan situacion kun la Gaela lingvo kaj ankaŭ unu prelego pri la romaa lingvo. Prelegis gravaj fakuloj esperantistaj kiel Wim Jansen, Renato Corsetti, Angela Tellier, Michele Gazzola, Nikola Rašić, Zlatko Tišljar, Jozef Reinart, Tim Morley, Paul Gubbins, k. a.

La organo de EEU ankaŭ havis siajn kunsidojn. Ĝi akceptis raportojn kaj diskutis la ĉefajn punktojn de la nuna politiko de EEU: kiel agi pri la demando de

popola iniciato post kiam la EK malakceptis registri nian proponon pri iniciato rilate la eŭropan himnon kaj pri nia estonta agado en Platformo pri multlingvismo establita de la Eŭropa Komisiono, en kiu malfermas novaj eblecojn. La estraro kunsidis unufoje, ĉefe traktis la demandon de la financoj de EEU, kaj akceptis inviton ke la 10a kongreso de EEU okazu en 2014 en la slovaka urbo Nitra.

Svedaj partoprenatoj estis: Leif Holmlund kaj Dan Palm



## Trajne tra Ĉinio al UK

Iom pli ol unu semajnon antaŭ la UK en Hanojo, ni kvar esperantistoj, Kristin Tytgat el Belgio, Bengt Nordlöf, Peter Bankholm kaj mi el Svedio, renkontiĝis en la flughaveno de Helsinki por vojaĝi al Pekino. Dum tri tagoj pekina esperantisto Blua Ĉielo gvidis nin, interalie al la Granda Muro kaj la Imperiestra Palaco. Ni ankaŭ vizitis la oficejon de Ĉina Esperanto-Ligo (la supra bildo).



La tago de la vizito al la Granda Muro (vidu fronta paĝo) fariĝis aventura. Komencis pluvi, kaj pluvegis la tutan tagon. Ni tamen iom promenis sur la muro. Reveninte al la urbo ni devis fari ĉirkaŭvojojn kaj longe atendi en vicoj pro la amaso da akvo sur la stratoj. Kelkfoje ni sentis kvazaŭ ni estis en boato. La aŭto ŝanceliĝis kaj la akvo "klukis" ĉirkaŭe. Ni aŭdis ke estis la plej granda pluvego en 60 jaroj. La postan tagon, tamen, la akvo estis for.

Blua Ĉielo jam helpis nin aĉeti trajnbiletojn al Wuhan, urbo proksimume meze en Ĉinio. Ni havis kvarlitan kupeon, iom tro malgrandan por facile trovi lokojn por niaj valizoj. En Wuhan Trigo estis nia ĉiĉerono. Ni interalie vizitis la muzeon pri la revolucio kontraŭ la Qing-imperio en 1911 kaj domon, en kiu dum kelka tempo loĝis Mao Zedong.

La postan tagon ni kune kun Trigo prenis la trajnon al Nanning plej sude en Ĉinio. Li bedaŭrinde ne sukcesis akiri pli ol du dormlokojn en la trajno. La trajno estis tre malrapida. Ni devis plurfoje atendi kaj cedi la vojon al aliaj trajnoj kaj la vojaĝo daŭris proksimume 20 horojn. Kristin kaj Bengt ricevis la dormlokojn, ni aliaj sidis en plenplena kupeo. Ne estis multe da spaco kaj la kupeo estis terure malvarma. Homoj eĉ prenis la kurtenojn de la fenestroj por kovri sin.

En Ĉinio oni povas ricevi en restoracioj kaj ankaŭ en trajnoj varmegan akvon por prepari teon aŭ "rapidajn nudelojn". Homoj manĝis nudelojn tage kaj nokte. Do, dum vojaĝo en Ĉinio estas konsilinde kunporti termoson aŭ alian ujon, taŭgan por varmega akvo.

En Nanning ni tranoktis en bona hotelo kaj la postan matenon ni kun sufiĉe granda grupo de aliaj esperantistoj enbusiĝis por veturi al la vjetnama landlimo. Tie ni devis lasi la aŭtobuson kaj promeni, unue al la ĉina kontrolejo kaj poste al la vjetnama. Al Hanojo ni estis transportitaj en minibusoj, ne la plej agrabla maniero vojaĝi sed ni bonorde alvenis al la kongresejo, luksa hotelo Melia, la tagon antaŭ la komenco de la kongreso.

Pri la kongreso mem legu en aliaj raportoj.

Ann-Louise Åkerlund

## Språkcafé i Europahuset 26 september

I likhet med flera tidigare år uppmärksammas den europeiska språkdagen i form av ett språkcafé i Europahuset på Regeringsgatan i Stockholm.

Evenemanget är främst riktat till skolungdomar i åldrarna 13–18 år och syftar till att uppmuntra till språkstudier, inte minst genom möjligheten att prova på de många språk som finns representerade. Språkcaféet arrangeras av Nätverket Språkdagen i Sverige där Esperantoförbundet ingår tillsammans med flera ambassader och kulturinstitut, Europakommissionen, Skolverket och Språkrådet. I anslutning till Språkdagen finns även en tävling för skolungdomar där första pris är ett presentkort till en språkresa. Läs mer om Språkdagen på [www.sprakdagen.nu](http://www.sprakdagen.nu)

Olof Pettersson

## Esperanto iĝos integra parto de Android-telefonoj!

La poŝtelefonoj kaj tabulkomputiloj kiuj uzas la operacian sistemon Android baldaŭ aŭtomate havos Esperantan klavaron.

La klavaro laŭplane estos integra parto de la versio 4.2 de Android, aperonta komence de la jaro 2013.

La tuta artikolo estas legebla en Libera Folio. ([www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org))

## Nästa år ses vi i Karlstad

I maj nästa år planeras Esperanto-kongressen äga rum i Karlstad. Alla detaljer är inte klara ännu. Anita Dagmarsdotter undersöker olika möjliga kongresslokaler och aktiviteter såsom utflykt under fredagen. Hon har kommit en bra bit på väg redan. I nästa nummer hoppas vi kunna presentera fler detaljer kring arrangemanget i La Espero, men planera redan nu i kalendern att vi ses i Karlstad nästa år under Kristi Himmelsfärdshelgen den 10-12 maj.

Sola i Karlstad (Wikipedia)



## La kluboj en Malmö kaj Lund unuiĝis

Ŝajnas al mi ke la epoko de grandaj lokaj esperanto-kluboj malrapide siros al sia fino. La membroj konstatas ke inter la malkreskanta aro estas ĉiam pli malfacile trovi funkciojn por la estraro ktp.

La apero de la reto kun kontaktecoj tutmonde igas la klubojn ne plu tiel bezonataj kiel antaŭe.

Tio ne signifas ke la kluboj devas malaperi. Povas resti grupo da aktivuloj kiuj laboros i a pri informado, kursoj, internaciaj vizitoj ktp. Tial estas grave ke klubo, kiu sentas problemojn aktive pluvivadi en tradicie organizita formo, kontaktu alian klubon por kunlaboro aŭ eĉ unuiĝo.

Ĉi tion sentis niaj amikoj en Lund, kiuj aŭtune de 2011 kontaktis nin en Malmö. Dum komuna estrarkunsido ni pritraktis ĉiujn demandojn por tia

unuiĝo. Dum la printempo estis farita la birokrate laboro por malfondi La Esperantoklubon de Lund, tiel ke ekde la 1/5 2012 ĝi daŭros kiel sekcio ene de Klubo Esperantista de Malmö. Lund estas grava universitata urbo kaj gravas la esperanta aktiveco tie, por kiu ni rezervis la restantan kapitalon de la Lunda klubo. Gravas ankaŭ havi reprezentantojn el Lund en la komuna estraro kaj aliaj sekcioj.

Mi bonvenigas la Lundanojn al nia komuna klubo kaj konsilas al aliaj kluboj en eventuale simila situacio fari la samon.

**Sten Svenonius**

Prezidanto de  
Klubo Esperantista de Malmö



**O**kaze de la planita KEF (Kultura Esperanto Festivalo) en Kopenhago ni havis la eblecon oferti koncerton al la Malmöanoj. Ĝi okazis en la plej "varmega" loko en Malmö, ĉe Kungälv, Gustav Adolfs torg en la 11/7, 14-17 h.

Estis prezentadoj de Martin Wiese, Dolchamar kaj Hotel Desperado. Kelkaj homoj sekvis la koncerton, aliaj preterpasis. Kiel ajn ni havis eblecon dume doni informojn al interesitoj en aparta tendo.

Entute sukcesa aranĝo en bela somera vetero. Ĉefa surloka organizanto estis Per-Olov Johansson kaj la subskribinto.

La grupfoto montras la muzikistojn, helpantojn kaj iujn entuziasmajn spektantojn.

La foto pri la tendo ktp montras la lokon, "Kungälv", la plej populara prezentejo en Malmö

Sten Svenonius



## Jarkunveno

**S**abate la 21-an de julio, SEJU jarkunvenis kadre de renkontiĝo ĉe la hejmo de prezidanto Robin en Solna. La jarkunveno, kiu estis malfruigita kontraŭdire la statutojn, enhavis neniujn mirindajn decidojn sed envenigis novan estrarmembron Ingemar-n. Ingemar ĵus studis en Lund por esti lokomotivisto kaj nun loĝas en Sundsvall. Ni estis naŭ renkontiĝantoj kaj kunvenantoj, kiuj post la kunveniĝis promenon en Haga parko, diskutojn kaj amikumadon.

**SEJU-reprezentanto**

Inter alie, oni elektis min denove kiel reprezentanton de SEJU en la estraro de SEF. Mi post kelka monato dum la pasinta jaro, ne aktivis en tiu rolo. Mi pardonpetas pro tio kaj klarigas per tio ke longaj kunvenoj en Skype ne multe logis min. Por la venonta jaro, mi celas esti pli aktiva. Tamen ne por partopreni la kunvenojn – almenaŭ ne regule – sed por teni fluon de interesaj informoj inter la du estraroj ĉefe per retroŝtaj mesaĝoj.

Arild Mattsson

## Anna-Greta Strönne, 1912-2012

**A**nna-Greta Strönne naskiĝis en 1912 en vilaĝo en Skanio. Ŝi mortis 100-jara, la 19 aŭgusto 2012 post mallonga periodo de malsano.

Anna-Greta edukiĝis kiel poŝta ekspedisto, kaj laboris dum kelkaj el la 1930-aj jaroj en diversaj urboj de Svedio. Tie ŝi havis kontakton kun gejunuloj kiuj ŝatis promeni en la naturo, kaj ankaŭ eklernis esperanton. En 1934 ŝi eklaboris en Malmö, kaj tie ŝi konatiĝis kun Jan Börje Strönne. Ili geedziĝis en 1939, kaj ekhavis du filinojn en la 1940-aj jaroj.

Ekde la komenco, la hejmo de la paro Strönne gastigis esperantistojn el foraj landoj, kiuj prelegvojaĝis en Svedio. Anna-Greta estis dum longa periodo kluba mastrino de la Klubo Esperantista de Malmö, kaj ŝi kontribuis al la dan-svedaj esperantotagoj. Ŝi partoprenis la preparlaboron por la universala kongreso en Malmö 1948. En la 1950-aj jaroj ŝi vizitis aliajn kongresojn kaj la svedajn somerajn semajnojn en Frostavallen.

Ek de la komenco de la 1960-aj jaroj, Anna-Greta laboris dum du jardekoj kiel ekspedistino ĉe la Eldona Societo Esperanto en Malmö, kaj havis kontaktojn kun svedaj kluboj kaj kun eksterlandaj



libroservoj. Pli poste ŝi uzis la sciojn pri libroj, kiam ŝi aranĝis la bibliotekon de la esperantoklubo de Malmö.

Ekde la jaroj ĉe la sveda Poŝto, Anna-Greta interesiĝis pri filatelio, kaj en la jubilea jaro 1987 ŝi organizis ekspozicion "Filateli kring esperanto" ĉe la sveda poŝta muzeo en Stockholm, pri kio la Poŝto aranĝis memoran stampon.

Anna-Greta ĉiam retenis la intereson pri promenoj en la naturo, inter alie per vojaĝoj al la svisa

montaro kaj al mediteraneaj insuloj, kaj ankaŭ per partopreno en lokaj geologiaj ekskursoj en Skanio. Pli poste ŝi gvidis klubajn promenojn en la parkoj de Malmö, kie ŝi havis sciojn pri ĉiuj arboj.

Multaj amikoj el ŝia generacio jam malaperis, sed ŝiaj amikoj el malpli aĝa generacio, leterkontaktoj tra la mondo kaj amikoj en Malmö, same kiel la familianoj sentos ŝian mankon.

Gertrud Lund  
Ulla Luin

---

## Rune Moln 1953 - 2012

**R**une Moln avled 27/5. Han föddes den 6 april 1953. Begravningen skedde den 8 juni i Östra kapellet med borgerlig ceromeni. Den kvinnliga förrättaren berättade att Rune Moln var intresserad av språk och framförallt Esperanto. Musiken var av Taube.

Eftersamling i EFS samlingslokal med förtäring och bildvisning om Runes liv. Arne Lundkvist deltog vid begravningen och höll ett tal om Rune Moln och om gemensamma upplevelser med Esperanto. Rune Moln deltog bland annat i kongressen i Köpenhamn.

Arne Lundkvist